der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes der DDR im Kulturbund e. V.

26. Jahrgang | Nr. 162 (4/1990) ISSN 001 4-0619 | 2 DM

Dum 25 jaroj – Esperanto en Kulturligo. Kaj la estonto: tutgermana!

En la jaro 1965, la 31-an de marto, oni fondis en la siatempa Germana Kulturligo la Centran Laborrondon de la Esperanto-Amikoj, poste nomita simple Centra Laborrondo Esperanto, kaj fariĝinta ekde 1981 Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Do, la historio volas, ke ĝuste en ĉi tiu tempo nia reoficialigita Esperanto-movado (nun sub la nomo „Esperanto-Asocio de GDR en Kulturligo") fariĝis 25-jara. Bilancon ni prezentos alifoje kaj aliloke. Ne nur pro la jubileo, sed pro la fakto, ke GDREA baldaŭ malaperos. Ni ne scias precize kiam, sed certe kune kun GDR, do eble fine de 1990, aŭ jam, kiam vi legos tiujn liniojn? Bilancon, faktoriĉan, kritikan (kompreneble), ni devas prezenti, ĉar krom ni mem neniu alia tion faros. Kaj ĉar tion ni ŝuldas al la multaj, kiuj investis centojn kaj milojn da horoj en la ideon kaj praktikon de Esperanto, sur la teritorio de la ankoraŭa GDR kaj internaciskale. Pri la estonteco malfacilas prognozi. Kulturligo multon donis al ni. Estus malhoneste, eĉ malmorales tion nei. Ĉu Kulturligo ekzistos plue? Eble! Eble ne! Sed la Esperanto-movado sur ĉi tiu teritorio [aligota al FRG] ekzistos. Do, ni pretigu nin por la tutgermana estonteco. La kontaktoj inter GEA kaj GDREA bone evoluas. Vi legos pri tio en ĉi tiu kajero. Ni ne havos malplenajn manojn por la komuna estonteco. Kaj pri tio ni fieru, digne kaj sobre. Kvankam dum tiuj 25 jaroj multo ne eblis (ekz. vojaĝoj okcidenten, abono de okcidentaj Esperanto-revuoj, amasa partopreno en multaj Esperanto-aranĝoj okcidentlande), tamen ja multo fareblis. Kulturligo donis nemalbonan kadron por nia agado. Kompreneble ekzistis reguloj kaj limigoj pro ŝtataj leĝoj, kiujn ankaŭ la esperantistoj ne povis eviti. Sed oni povis labori por Esperanto kaj apliki la lingvon. Kaj tion pere de Kulturligo. La ŝtato malavare subvenciis. Tio ĉesos.

Ĉu ni havos novajn ŝancojn? Certe. Ĉu ni uzos ilin? Tio dependos de vi kaj de ni ĉiuj. Eble oni evitu tro hastajn paŝojn! Ni povus imagi al ni jenajn etapojn por atingi la komun-germanan Esperanto-movadon:

1. Reciproka konatiĝo kaj ekrilatiĝo sur ĉiuj ebenoj [farata].
2. Certatempa paralela ekzistado de du asocioj, do GEA kaj, eventuale, OGEA (Orient-germana Esperanto-Asocio), por havi tempon por trankvile prepari la kondiĉojn por digna kaj efika kunfandiĝo de ambaŭ asocioj. La laboron de ambaŭ asocioj kunordigados „Germana Esperanto-Komitato", en kiu sidos demokrate elektotaj delegitoj de la estraroj de ambaŭ asocioj.
3. Kunfandiĝo de GEA kaj OGEA al iu nova tutgermana Esperanto-Asocio, kiu estos nek GEA nek OGEA, sed io nova.

Mi, evidente, subtenas la ĝeneralan sintenon de la prezidanto de GEA, d-ro Schwanzer, laŭ kiu oni ne unue geedziĝu por nur poste prepari la fianĉiĝon.

D. Blanke

Intervjuo kun la prezidanto de GDREA, d-ro Ronald Lötzsch

La Centra Estraro de GDREA elektis vin prezidanto. Ni kore gratulas kaj petas vin respondi al la redakcio kelkajn demandojn.

Kiam kaj sub kiaj cirkonstancoj vi konatiĝis kun Esperanto?

Mi tion ne rememoras precize. Verŝajne tio okazis en la jaro 1948, ĉar en la komenco de la jaro 1949 mi jam instruis Esperanton al gejunuloj en nia vilaĝo kaj al kunlernantoj en nia lernejo. Jam en mia infaneco mi interesiĝis vigle pri lingvoj. La unua „lingvo", kiun mi scipovis, estis mia ercmontara dialekto, kiu esence diferencas de la germana literatura lingvo. Tiun ĉi mi ellernis fakte nur en la lernejo. Ekde la kvina klaso mi konatiĝis kun la angla lingvo. Tiel mi eksciis, ke parencaj lingvoj aŭ dialektoj de unu lingvo posedas ege interesajn diferencojn. Pri tio mi volis scii pli multe. Tial tuj post la milito mi utiligis ĉiujn eblecojn, por ellerni kiel plej rapide kaj bone la rusan lingvon, kiu kiel slava lingvo havas tute alian strukturon ol la ĝermanaj. Samtempe mi okupiĝis pri la hungara lingvo, kiu ja ne estas hindo-eŭropa, sed ugro-finna. Tiamaniere mi eksciis ankaŭ ion pri Esperanto, eble de instruisto, kiu laboris kelkajn monatojn en nia lernejo kaj kies nomon mi forgesis. Sed mi memoras, ke mi vizitis lin foje en lia loĝejo en la vilaĝo Erlbach, situanta inter Stollberg kaj Chemnitz, kie li montris al mi sian lingvistikan disertacion (li estis doktoro fil.), en kiu figuris ankaŭ esperantaj ekzemploj. Eble de li mi ankaŭ ricevis la lernolibron, per kiu mi lernis Esperanton. Kiu estis tia lernolibro, mi ankaŭ ne memoras precize, ĉar konekse al mia aresto en la jaro 1957 ĉiuj miaj esperantaj libroj estis konfiskitaj kaj perdiĝis. Verŝajne tio estis „Esperanto. Kleines Lehrbuch der Weltsprache" de „P. Brikisto", kies unua eldono aperis en la jaro 1948.

De la 3-a de februaro ĝis la 8-a de aprilo 1949 mi skribis taglibron en Esperanto. Tiu ĉi taglibro feliĉe ne perdiĝis kaj iamaniere apogas mian memoron. Sub la 25-a de februaro ekzemple ĝi enhavas la noton: „Hodiaŭ nia Esperanto-kurso estas malpermesita de FDJ, por ke la tempo liberiĝu por unu aŭ du rusaj kursoj! Tio ĉi estas evidenta pruvo de la ‚libereco' en nia zono." La 14-an de marto mi notis jenon: „Nia Esperanto-kurso ree estas permesita. Ni ankaŭ organizis rusan kurson en nia klaso por tiuj, kiuj ankoraŭ nemulte scias." Ambaŭ notoj pruvas, ke jam antaŭ la ĝenerala malpermeso de Esperanto en GDR ĝia disvastigado estis rigardata kiel malhelpado de la instruado de la rusa lingvo.

Post la abiturienta ekzameno mi laboris kiel instruisto de la rusa kaj latina lingvoj kaj ne plu okupiĝis pri Esperanto. Tiel same dum la studado en Sovetunio dum la jaroj 1951–1956. Kvankam en la jaro 1956 mi unuafoje eksciis ion pri la revivigo de Esperanto en Sovetunio, mi ankoraŭ ne „reesperantistiĝis". Tro grandaj estis miaj interesoj sur aliaj kampoj de la lingvistiko. Krome mi perdis pli ol tri jarojn pro la jam menciita malliberigo. Tiamaniere mia „reesperantistiĝo" okazis nur en la komenco de la 80-aj jaroj.

Kial vi estis malliberigita?

Mi finis mian studadon en Sovetunio ĝuste post la 20-a kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio kaj kuntravivis la unuajn modestajn provojn de almenaŭ parta forigo de la stalinismo. En GDR la reĝimo de Ulbricht ne akceptis eĉ tiajn duonajn klopodojn. Pri tio mi ne konsentis. Kune kun amikoj kaj kolegoj mi postulis demokratiigon de SED kaj GDR. De la reganta grupo tio estis rigardata „kontraŭrevolucia komploto". La plej aktivaj diskutantoj, inter ili ankaŭ mi, estis arestitaj kaj kondamnitaj al malliberigo. La 24-an de aprilo kaj

la 22-an de majo de tiu ĉi jaro la Supera Kortumo de GDR kasacíis la verdiktojn kaj rehabilitis nin.[1)]

Kion vi volus diri pri via profesio?

Kiel mi jam diris, mi ĉiam interesiĝis pri lingvoj, precipe pri la diverseco de lingvaj strukturoj. Tial mi klopodis lerni kiel eble plej multajn diversajn lingvojn. Precipe intensive mi okupiĝis pri slavaj lingvoj, antaŭ ĉio pri la rusa kaj tiu, kiu estas parolata ekskluzive en GDR, la soraba. Mia disertacio, publikigita en la jaro 1965, temas pri „Die spezifischen Neuerungen der sorbischen Dualflexion". Pli ol dek jarojn mi dediĉis al la ellaboro de trivoluma german-rusa vortaro[2)]. Problemo, kiu min ĉiam speciale interesis, estis tiu de la t. n. miksiĝintaj lingvoj. Pro tio mi tiom multe okupiĝis pri la sorabo lingvo, kiu estas influata dum jarcentoj de la germana lingvo. Mi krome okupiĝis pri la jida, tio estas ĝermana lingvo, enhavanta multegajn semitajn kaj slavajn elementojn. Ankoraŭ ĉi-jare aperos mia jidgermana vortareto[3)]. Krome mi ĉiam interesiĝis ankaŭ pri ĉiuj demandoj de lingva politiko, precipe en multnaciecaj kaj multlingvaj ŝtatoj, antaŭ ĉio en Sovetunio.

Kion vi kiel lingvisto opinias pri Esperanto?

Miaopinie ĝi estas plenvalora interkomprenilo, kapabla esprimi la plej subtilajn nuancojn de homa pensado. Pro la senescepteco de la gramatikaj reguloj ĝi estas multe pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo. Kvankam konscie, „artefarite" konstruita, ĝi jam delonge evoluas preskaŭ kiel „natura", etna lingvo.

Kiun signifon havas laŭ vi la politikaj ŝanĝoj, okazintaj en GDR, por Esperanto?

Antaŭ ĉio malaperis ĉiuj burokrataj obstakloj, kiuj ĝis antaŭ kelkaj monatoj faris praktike neebla individuan vojaĝadon ekster la limojn de la GDR-a teritorio al okcidentaj landoj. Nun ĉiam pli multaj mem konvinkiĝos, ke la neebleco de senpera lingva komunikado plimalmultigas la utilon kaj la plezuron de iu ajn vojaĝo eksterlanden. Kaj verŝajne iom post iom ĉiam pli multaj sentos, ke ne sufiĉas interkompreniĝi iamaniere per primitiva, malkorekta angla lingvo, kiu cetere tute ne estas tiom facile lernebla kiom oni kutime pensas.

Certe, homoj el landoj sen burokrata malhelpado de vojaĝado faris tiun ĉi sperton multe pli frue. Kaj tamen la sukcesoj de la propagandado de Esperanto restis modestaj.

Sed nun la situacio pliboniĝis ankaŭ en alia rilato. Ĝis antaŭ nelonge ni devis respekti certajn tabuojn. Unu el ili estis la dogmo pri la signifo kaj la internacia rolo de la rusa lingvo. Estis malhelpita ĉio, kio laŭdire malhelpis ĝian devigan instruadon, kaj tian malhelpadon oni kelkfoje vidis ankaŭ en la klopodoj por Esperanto. Nun tiu ĉi tabuo malaperis. La lernado de la rusa lingvo estos nedeviga, kaj ni esperas, ke iom post iom ni sukcesos konvinki la respondecajn politikajn rondojn, ke estus utile enkonduki ankaŭ Esperanton kiel nedevigan instrufakon.

Tiu ĉi espero krome baziĝas sur alia fakto. En la t. n. socialismaj landoj la oficiala propagando disvastigis la tezon, ke en Sovetunio la lingva problemo estas laŭdire solvita per helpo de la rusa lingvo. Nun tio montriĝis legendo. Preskaŭ ĉiutage la amaskomunikiloj informas pri interetnaj konfliktoj en Sovetunio, kaj sufiĉe ofte ni aŭdas aŭ legas, ke ĉe tio grandan rolon ludas ankaŭ lingvaj problemoj. Ĉio ĉi pruvas, ke ne nur en Hindio aŭ Niĝerio aŭ en iu ajn alia multlingva ŝtato de Azio aŭ Afriko, sed ankaŭ en la plej granda multlingva ŝtato, kiu okupas grandan parton de Eŭropo, la lingva problemo ne estas solvebla per helpo de iu etna lingvo. Sen la radikalaj ŝanĝoj, kiuj okazis dum la lastaj monatoj, ni ne rajtus publike paroli aŭ eĉ skribi pri tiu ĉi fakto. Nun ni povas atentigi pri tio, ke ankaŭ la ekzemplo de Sovetunio pruvas, ke la problemo de senpera interetna interkompreniĝo estas solvebla nur per helpo de neŭtrala planlingvo. Kaj la sola reale ekzistanta kaj funkcianta planlingvo estas Esperanto.

En kio vi vidas la plej gravajn taskojn de nia asocio por la estonteco?

La plej grava tasko miaopinie estas la konsciigo de la ĵus karakterizitaj faktoj. Apenaŭ malpli grava estas la organiza adaptigo de nia asocio al la novaj kondiĉoj en unuiĝanta Germanio. Tio signifas la reorganizon de GDREA sur la bazo de nova statuto, kies kerno estos la fondiĝo (ne fondigo!) de kvin regionoj kun grandaj rajtoj, kaj la aranĝado de niaj rilatoj kun GEA de FRG.

Kiel fartas GDREA?

Tiun demandon oni ofte starigis al ni en- kaj eksterlande lastatempe. Pro kompreneblaj kaŭzoj. Kvankam GDREA neniam apartenis al la fortaj esperantistaj organizoj, ĝi tamen ja havis sian tute atentindan aktivecaron kaj internacian reputacion, malgraŭ la konataj limoj, kiuj kaŭziĝis en la ŝtata situacio de GDR. Tiu demando estas komprenebla ankaŭ pro tio, ĉar ni ja havos novajn ŝancojn. Ĉu ni jam uzas ilin? Samtempe en nia ankoraŭa lando multo detruiĝas kaj estas tute konscie disbatata ankaŭ en la sferoj de la amaskomunikiloj kaj kulturo.

GDREA apartenas al la kultura sfero de GDR, ne nur pro la ligiteco al Kulturligo. Respondante la titolan demandon nun (meze de julio), se ankaŭ nur nekomplete, ni ne scias, kia estos la situacio, kiam vi legos ĉi tiujn liniojn.

1. Ĉar la sorto de GDREA ĝis nun estis intime ligita kun Kulturligo, ni demandu pri ties sorto. Fakte Kulturligo ankoraŭ funkcias kun siaj multaj fakaj asocioj, interesogrupoj, tradiciaj aranĝoj k. s. Tamen, jam videblas minacoj, ke oni draste reduktos la nemalhaveblan ŝtatan subvencion aŭ eĉ tute nuligos ĝin. Se oni nuligos la subvencion, oni mortigos multon, inter alie la profesian oficejon de Kulturligo, do ankaŭ tiun de GDREA. Krome, ekde decembro 1990 ne plu ekzistos GDR. Tio ŝajnas klara. Ĉu tiam ankoraŭ ekzistos Kulturligo? Eble! Oni ja povas imagi, ke en la kvin nove formiĝintaj federaciaj landoj (= la teritorio de „eks-GDR") dum certa tempo ankoraŭ pluvivos tiu Kulturligo, kiu fondiĝis antaŭ 45 jaroj, la 3-an de julio 1945. Sed tiu Kulturligo, se entute, ĉefe ekzistos sur landa ebeno. Nur tre malgrandan centran oficejon ĝi eble havos. Povus esti avantaĝe, ankaŭ sub tiaj kondiĉoj, ke la esperantistoj restu en Kulturligo. Eble oni decidos alie. Kiu scias? Vi diros, GDREA ja ne plu povos ekzisti, ĉar mankos GDR. Jes, sed por vere laŭpaŝe ebligi sencohavan kunfandiĝon de la Esperanto-movadoj el ambaŭ landoj, oni povas imagi, ke por certa tempo eks-GDREA povus funkcii kiel OGEA (= Orientgermana Esperanto-Asocio) aŭ simile. Pri tiu ideo de laŭpaŝa kunfandiĝo vidu paĝon. 73 kaj 76 Sed ni lasu la spekulacion. Ĉi-momente Kulturligo ekzistas, kaj GDREA estas parto de ĝi.
2. GDREA funkcias. Laboras ĝia Centra Estraro kaj ties prezidio. Aktivas la ankoraŭaj distriktaj organizaĵoj, kvankam tre malsamintense. La oficejo funkcias, kvankam ne plu kun 4,5 geoficistoj (kiel 1989) sed kun 2,5. GDREA organizis tute sukcesan internacian seminarion en Bad Saarow (trovu la raporton ĉi-kajere) kaj la tre sukcesan 5-an Centran Renkontiĝon. Kursoj okazis. Varbado ankaŭ. La korespondan kurson ni haltigis antaŭ la valutoŝanĝo pro kompreneblaj kialoj. Preskaŭ pretas tute nova, pli moderna koresponda kurso el la plumo de *Ulrich Becker*. „der esperantist" aperadas, kun la diablaj malfruoj. Kaj tamen, ni nun trovis novan presejon ĉe Berlin. Ĉu tio helpos? Ni vidos. La revueto nun provas realigi i. a. du celojn:
   a) helpi al la esperantistoj de GDR rapide orientiĝi pri la strukturo de la internacia Esperanto-movado (pro tio, i. a., la rubrikoj Movado I + II), kaj
   b) fiksi kiom eble plej multe, superrigarde, pri tio, kion GDREA faris dum 25 jaroj. Certígí, ke tio ne perdiĝu, ni simple ŝul-

---

Kiun rolon Esperanto povus ludi laŭ via opinio en la „Eŭropa domo"?

La unuiĝanta Eŭropo havos la karakteron de konfederacio de egalrajtaj popoloj kun egalrajtaj lingvoj. Tia multlingva komunumo bezonos kiel interpopolan interkomprenilon neŭtralan lingvon. Tiu ĉi lingvo povus esti Esperanto.

Notoj de la redakcio:

1) Temas pri la proceso kontraŭ la verkisto Erich Loest, al kies grupo apartenis d-ro Lötzsch. Pri la kasacia proceso oni povis legi i. a. en NBI 21/1990.
2) Deutsch-Russisches Wörterbuch. Bd. 1: A–G, 1983, 764 S., Bd. 2: G–R, 1984, 706 S., Bd. 3: S–Z, 1984, 787 S. Akademie-Verlag Berlin (Autorenkollektiv unter Leitung von Ronald Lötzsch).
3) R. Lötzsch: Jiddisches Wörterbuch. Leipzig: Bibliographisches Institut 1990, 256 S.

das al niaj membroj, kiuj investis centojn kaj milojn da horoj en la poresperantan agadon. Kaj, eble la estonta tutgermana Esperantomovado ne tute ignoru spertojn akumulitajn en la iama GDR.

Bedaŭrinde „Paco" ĉi-jare ne povos aperi. Mankas la mono. Bedaŭrinde falis la nombro de abonantoj de „der esperantist". Jes, ja, la prezoj terure plialtiĝis, por multaj varoj. La prezo por „der esperantist" plialtiĝis. Kion fari...?

Valoras mencii, ke krom la libroservo de *Thorsten Lemke* ekaperis nova: tiu de *Rolf Beau* („Espero"). Ambaŭ servoj fakte estas sendependaj de GDREA, sed kunlaboras kun ĝi. Valoras mencii la privatan iniciaton de *Hans-Peter Bartos,* la Esperanto-Centro Halle. La Esperanto-Junularo (GDR) agadas, ankaŭ kontakte kun GDREA (kiu, cetere, pagis por ĉi-jaro denove la kotizon por TEJO-membreco, kaj tion volonte faris). Ĉi-jare la kongresoj okazis en Kubo, la Universala kaj la junulara. Bedaŭrinde, pro monmanko, ne eblis sendi oficialajn delegitojn. Veturis kelkaj private. Sed ni jam komencis forte varbi por la 76-a UK, kiu okazos en 1991 en Bergen, la norda norvega urbo. Prezidianoj de GDREA vizitis la Centran Oficejon de UEA por stimuli la kunlaboron. La german-germanaj rilatoj plivigliĝadas. Krom tio ni ja havas multajn internajn problemojn por solvi: ellabori novan statuton, subteni (se necese) la formiĝadon de landaj asocioj en GDR. Ni instalas novajn universitatajn kursojn kaj sendis proponojn al la ŝtata radiofonia komitato de GDR kaj al la ministro pri klerigado kaj scienco pri la akcepto de Esperanto. Do—ne eblas diri, ke GDREA ne laboras.

3. Bone, vi diros, temas pri centraj aktivecoj. Kion faras kaj pensas la bazo? Certe, la unuopaj membroj, grupoj kaj estraroj havas pri multo, farita dum la pasinteco kaj farata nuntempe, malsaman opinion. Tio estas tute normala. Sed la esperantistajn renkontiĝojn en Berlin, Brandenburg, Neubrandenburg, Hoyerswerda, Magdeburg kaj Schwerin, kiujn mi vizitis, mi forlasis kun ĝojo. Ja la movado plufunkcias sur la bazo, ne senprobleme, ne samintense. Sed estis sentebla la solidareco kun GDREA, la preteco resti en Kulturligo. Aliflanke ankaŭ aŭdiĝas voĉoj, kiuj proponas tujan aliĝon (ĉu individuan ĉu grupan) al Germana Esperanto-Asocio (GEA). Estas interese, ke tiuj maloftaj proponoj precipe venas de homoj, kiuj antaŭe ne multon faris, ne konas la historion de GDREA, ne scias pri la gravega subteno, kiun la Esperanto-movado en GDREA ĝuis flanke de Kulturligo. Ili precipe elstarígas la evidentajn limojn, kiujn en la pasinteco havis GDREA kaj Kulturligo. Kaj ili ne komprenas, ke ĝuste Kulturligo ofte ebligis, ke tiuj limoj ne estu tro doloraj. Finfine Kulturligo kaj GDREA devis akcepti regulojn validajn en GDR. Malobei tiujn regulojn (do, simple ne sekvi ilin) estus signifinta endanĝerigi la ekzistadon de GDREA. Kompreneble, kritiko pri la pasinta kaj nun farata agado estas facila, eĉ normala. Se ĝi estas helpa, konstruktiva kaj justa, ni devas akcepti ĝin. Nemotivitan kaj neaferecan, por ne diri malican, ni devas kategorie malakcepti. Iuj foje forgesas, ke nek la Centra Estraro, nek la prezidanto aŭ la sekretario estis aŭ estas GDREA. GDREA estas la tuteco de ĝia membraro kun ĉiuj aktivecoj. La aktivuloj, grupgvidantoj, estraranoj kaj pagitaj oficistoj estas senpovaj, se la membroj ne kunagadas. La honoroficaj funkciuloj laboris post la plena labortago kaj senpage donis sian kontribuon al Esperanto. Kaj la pagitaj funkciuloj de GDREA? Nu, ili ne konis kaj ne konas 8-horan labortagon kaj ili ĝenerale plenigis la semajnfinojn per nepagita laboro.

4. Do kiel fartas GDREA? Laŭ la cirkonstancoj, oni povus respondi. Ni ne malkonfesu nian historion. Ni ne rezignu antaŭ malfacilaĵoj. Ni ekkonu kaj ekprenu la novajn ŝancojn. Kaj antaŭ ĉio: Hastante al kiom eble plej rapida senorda unuiĝo kun GEA, GDREA (aŭ la eksa) nur povas perdi, nome la propran dignon kaj la kapablon vere alporti sian kontribuon por riĉigi la tuton. Ĉu iu volas tion? Do bonfartu la estonta tutgermania Esperantomovado.

D. Blanke

Antaŭ la naskiĝo de nova infano

...necesas krei la konvenajn kondiĉojn. Ĉu ni havos **novan** infanon en la internacia familio de la Esperanto-organizaĵoj? Aŭ ĉu nur unu jam malnova membro de la familio fariĝos simple nur iom pli dika? Per glutado? Ŝajnas al ni, ke la artikolo 23 de la konstitucio de FRG ne enestas en la statuto de GEA, do ne povas validi por la kunfandiĝo de GDREA (respektive ties posteulo) kaj GEA.

Unuiĝos samrangaj kaj samrajtaj partneroj. Sendube ni devas helpi tiun procezon. Necesas evoluigi la rilatojn kun GEA ĉiuflanke. Pro tio kelkajn konsiderojn:

1. Tute evidente membroj de GEA apenaŭ konas GDREA, kaj inverse. La politikaj cirkonstancoj dum la pasinteco ne estis tiaj. Sed ankaŭ alia kialo ekzistis, ne aparte okupiĝi pri tiuj rilatoj: La celo de GDREA, kiel de ĉiu alia landa aŭ internacia Esperanto-organizaĵo ja estis venki la lingvan barilon. Germanoj el ambaŭ germanaj ŝtatoj jam havis komunan lingvon, kial aldoni duan malpli bone regatan?
2. Tamen, la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. Ni havas antaŭ ni la taskon unuigi la potencialojn de ambaŭ movadoj, kreante novan landan asocion, kiu estos nek la malnova GDREA (evidente!) kaj nek la malnova GEA. Ĝi estu io nova. La sumo estu pli ol la simpla unuigo de la adiciatoj. Do – unue ni bone konatiĝu unu kun la alia kaj konstruu fortajn ligojn.
3. La nunaj antaŭkondiĉoj ne estas malbonaj. Dum la pasinteco ne ekzistis speciale gravaj streĉitecoj inter la du asocioj. Jam antaŭ la aliĝo de GDREA al TEJO kaj UEA (antaŭe kiel „Centra Laborrondo Esperanto“ kaj ties Junulara Sekcio) GEA ne malfaciligis al ni la agadon en internaciaj organizoj. Verŝajne aparte pozitivan rolon siatempe ludis *d-ro Werner Bormann* kaj *Elsbeth Bormann*, ambaŭ prezidintoj de GEA. En la komitato de UEA la komitatanoj de GEA kaj GDREA kolegece kunlaboris. Kadre de tiuj internaciaj aranĝoj en GDR, kiuj estis „malfermitaj“ ankaŭ por okcidentanoj (ekz. la seminarioj en Ahrenshoop kaj Bad Saarow, IFER, IMEK k. s.) ne mankis gekolegoj el FRG. Kaj ŝajne ili ne malbonfartis ĉe ni. Bedaŭrinde GDREA-anoj ne havis eblecon reciproki la vizitojn. Sed tio ja ŝanĝiĝis.
4. Jes, la prezidioj de GEA kaj GDREA eknodis bonan kontakton. Marte en Berlin, maje en Brandenburg, junie en Freiburg. La distriktaj estraroj kaj grupoj jam havas viglajn rilatojn, reciprokis vizitojn, prelegojn, materialinterŝanĝojn ktp.
5. Sed tio nur estas komenco. Oni povus kaj devus fari pli. Jen kelkaj sugestoj:
   - 5.1. Pli ampleksa reciproka interŝanĝo de „der esperantist“ kaj „Esperanto aktuell“. La organo de GEA estas abonebla en GDR. Ankaŭ GEA-anoj, laŭdezire, povus ricevi „der esperantist“ de GDREA, ankaŭ malnovajn numerojn.
   - 5.2. Laŭ interkonsento inter la du prezidioj, oni interŝanĝos la adreslistojn de la ĉefaj funkciuloj (bedaŭrinde GDREA-anoj tro malrapide donas la necesan permeson). Tio helpas pli rektan kontaktadon.
   - 5.3. La partneraj urboj uzu siajn specifajn kanalojn.
   - 5.4. La asocioj povus interŝanĝi taŭgajn prelegantojn, laŭ la konkreta mendo de gastigontaj grupoj.
   - 5.5. Jam nun necesas interŝanĝi ideojn pri komuna eldonpolitiko. GDREA kaj GEA disponas pri bonaj fakuloj. Kial ili ne kunlaboru?
   - 5.6. Valoras mencii, ke GDREA disponas pri tuta aro da beletraj manuskriptoj (i. a. la traduko de la kompleta „Faŭsto“ el la plumo de *Karl Schulze*).
   - 5.7. Kaj kion pri komunaj aranĝoj kaj fakaj seminarioj?
   - 5.8. Finfine ni pensu pri la „Komuna Eŭropa Domo“ kaj ĝia lingva problemo. Jen nur kelkaj facile kompletigeblaj ideoj.

Do, ankoraŭ multo farendas antaŭ la naskiĝo de nova infano. Ĝi estu vivkapabla kaj forta. Antaŭtempe naskitoj ofte malfortas kaj malsaniĝemas...

D. Blanke

Kritiko

En la tuta lando regas kritika atmosfero. Oni kritikas juste kaj nejuste. Normale! Ĉu oni ankaŭ kritike rilatas al la pasinteco de GDREA? Dependas de tio, kiu estas „oni". Ke la agado de GDREA dum la pasinteco ne estis senerara, estas evidente. Same evidentas, ke regis reguloj en GDR, kiujn ankaŭ GDREA ne povis superi. Kaj ankaŭ veras, ke GDREA multon atingis. Eble pro tio la kritikaj voĉoj maloftas. Sed ili ja ekzistas. En „Saksa Kuriero" 1/90 *Achim Schulze* redonis kritikon de *Michael Lennartz*. Ni respondis en „der esperantist" 2/90 („Ĉu ni ne havis strategion?"). En TEJO Tutmonde aperis intervjuo, kiun *Hans-Peter Bartos* donis al la redaktoro *Andy Künzli*. La intervjuo grave distordis faktojn pri Kulturligo kaj GDREA kaj estis profunde malvera kaj malica misprezento. La redaktoro de TT ricevis komenton de ni, ni vidos, ĉu li publikigos ĝin. Feliĉe en „Die rationelle Sprache" 1–2/90 *H.-P. Bartos* („Wie weiter mit dem Esperanto-Verband?") publikigis pli ekvilibritan prezenton de sia opinio pri la rolo de GDREA, ĝia loko en Kulturligo k. s. La Centran Estraron ankaŭ atingis anonima letero el Karl-Marx-Stadt, en fuŝa Esperanto kun tute nebula enhavo. Ĝin ni flanken metu. Restas – ĝis nun – 2 leteroj de *Gerhard Hornbogen* el Weimar kaj unu de *Joern Grell* el Erfurt. S-ro *Hornbogen* tute ĝenerale postulis demokratiigon de GDREA kaj ke *Heinel* kaj *Blanke* faru memkritikon. I. a. li opinias, ke en la estonta Germanio ne trovus lokon du asocioj. Ankaŭ ŝajnas al li dubinde, ke necesas plueldoni „der esperantist". Pri ambaŭ problemoj oni vere devas pensi. Ni ĉikajere jam esprimis nian opinion pri paŝoj al la unuiĝo de la asocioj. Ĉu „der esperantist" pluaperos, estas pure financa afero. Se financoj ekzistos, estus bonvene eldoni ĝin ankaŭ en 1991. Kompreneble necesus interakordigi la enhavan profilon kun la redaktoro de „Esperanto aktuell". S-ro *H.* ankaŭ kritikas, ke ni ne informis pri la „Analiza Skolo" kaj „Speciala Cirkulero" de *Hermano Bermano,* kiun li tre laŭdas. Jes, ni ne propagandis la lingvan sektecon de la „Analiza Skolo", la esperantologie atakeblan dialekton de Esperanto, kiu ne trovas la subtenon de la Akademio de Esperanto. S-ro *H.* antaŭvidis en sia letero, ke kadre de la 5-a Centra Renkontiĝo en Brandenburg oni ne enplanis vere ampleksan diskuton pri la problemoj de GDREA. Nu, kaj s-ro *H.*, logike, ne partoprenis la aranĝon, kiu ja ĝuste donis diversajn eblecojn por pensinterŝanĝi. Krome s-ro *H.* opinias, ke la plenkunsidoj de la Centra Estraro okazis en tro luksaj hoteloj. Eble li pravas. S-ro *Joern Grell* estis pli konsekvenca kaj pli konstruva. Li partoprenis en Brandenburg kaj kundiskutis kritike. Li ankaŭ faris perletere konkretajn proponojn. Inter ili:

1. Kreo de germana Esperanto-asocio, kiu estu pli bona ol la du antaŭaj laŭ la formulo 1+1 povas esti pli ol 2.
2. Devus realiĝi, ampleksa kunlaboro sen burokrataj malhelpaĵoj aŭ strukturoj. La regiono devus ludi la ĉefan rolon.
3. Senkuraĝigitajn esperantistojn (eble pro GDREA) oni devus rekuraĝigi.
4. Regu pluralismaj agadmanieroj.
5. La kontaktoj al la internacia Esperantomovado fariĝu pli ampleksaj.
6. GDREA informu pri siaj financoj.
7. Oni parolu pri la eraroj de GDREA kaj publikigu materialojn pri la historio de Esperanto en GDR.
8. Esperantistoj, kiuj suferis reprezaliojn, estu rehonorigitaj.
9. Ampleksa diskuto de nova statuto de GDREA necesas.

Iom da respondo:

Pri 1+2 ni abunde traktis en kelkaj materialoj en ĉi tiu kajero. Ŝajne ni samopinias kun s-ro *Grell.*

3. Se ekzistas esperantistoj, kiuj **pro la laboro de GDREA** estis senkuraĝigitaj, tio estas bedaŭrinda afero. Almenaŭ ni ne celis tion. Aliflanke, vera esperantisto ne tro rapide senkuraĝiĝas, ankaŭ tiam ne, se lia/ŝia propono ne tuj realiĝis. La propono de s-ro Grell, ekzemple, ke GDREA komence de 1980 nepre aĉetu komputilon, simple ne estis realigebla. Kulturligo entute aĉetis similan maŝineton nur antaŭ du jaroj kaj nur nun (!) komencas serioze utiligi ĝin.

Pri 4+5 ni samopinias. Pri 7 aperos materialoj en la numeroj 5+6/90 de „de". Kaj pri 8: Se

Ŝanĝoj.

Inter la somero 1989 kaj printempo 1990 okazis en DDR grandaj ŝanĝoj. Tion ankaŭ respegulis la enhavo de la gazeto „der esperantist", ĉefe per 2 artikoloj.
La unua aperis en la numero 155 (3/1989) sub la titolo „Germana Demokratia Respubliko – 40 jara." Ĝi ege laŭdis la sukcesojn de la partiaj kaj ŝtataj gvidinstancoj dum la pasintaj jaroj kaj citis 7 punktojn, kiel tre valorajn rezultojn.
Mi nun havas jam delonge bonajn rilatojn al amikoj en DDR kaj eksciis de ili jam multe pli frue tute kontraŭajn opiniojn. Tio starigas al mi la demandon, ĉu la verkinto dum la skribado de tiu artikolo somere 1989 ne havis aliajn informojn kaj kredis ankoraŭ tion, kion li skribis, kvankam la kontraŭo estis preskaŭ palpebla ĉie ajn.
Sed kial li estus skribinta tion, se li ne firme estus kredinta ĝian verecon? Kritiki la reĝimon dum tiu tempo estis ankoraŭ tre danĝera. Do, se iu ne faris tion, estis komprenebla afero. Silenti pri tiu temo estis ebla kaj ankaŭ ne danĝera. Laŭdo estis la alia afero, ĝi eble estis moda aŭ oportuna. Multaj tion faris. Ĉu ili eble iomete kulpas pro la siatempa situacio?
La dua artikolo de la sama verkinto aperis en la numero 159 (1/1990). Nun li neis ĉion, kion li ankoraŭ jesis en la antaŭa artikolo. Li konstatis la multajn rifuĝintojn kaj ankaŭ la krimojn flanke de la partiaj kaj ŝtataj gvidinstancoj, same la ekflamon de „longe bruletinta krizo", kiun li ne vidis antaŭ ses monatoj, kaj li skribis ankaŭ, ke li eraris skribinte la unuan artikolon.
Ĉu tio vere eblis? Mi almenaŭ iomete dubas pri tio. Por konstati, ke la 7 laŭdaj punktoj en la unua artikolo tute ne akordiĝis kun la ekzistanta realeco nur necesis havi okulojn por vidi kaj orelojn por aŭdi. Tiuj 7 punktoj estis fakte la sama laŭda fanfaronado kiel la „senguste organizita pompa jubilado okaze de la 40-jariĝo" de DDR, kiun la verkinto kritikis en la 2a artikolo.
Sub la titolo „Tamen" li skizis en la dua parto de la sama artikolo la estontan laboron. Eble tio povus esti iam diskuttemo en GDREA. Sed en punkto e) li parolas pri ne-socialismaj landoj kaj en g) li skribis: „Ni tamen ne forgesu sisteme pliprofundigi niajn tradiciajn rilatojn al la esperantistoj el la socialismaj landoj, ..."
Tio instigas min al la demando, kie kaj kiaj estas tiuj socialismaj landoj kun kiuj oni tradicie volas estonte kunlabori?
Mi konsideras esti socialisto jam dum multaj jaroj, sed socialisman landon mi ĝis nun nenie povis ekkoni. Aŭ ĉu eble la uzo de tiu vorto „socialisma" nur estas kutimo, kiun oni ne tiom rapide povas forgesi? Socialistoj atentu ĉie ajn, ke oni ne tro kaj eĉ malĝuste uzu la vorton „Socialismo".

Friedel Bues, Hannover

---

ekzistas tiuj esperantistoj, kiuj suferis subpremon pro sia esperantisteco (do ŝajne antaŭ 1965), ni volonte ricevus informojn pri tio. En „Die rationelle Sprache" 3–4/90 *Hans-Peter Bartos* intervjuis tian homon.
9. La unuan version de nova statuto la Centra Estraro abunde diskutis dum sia lasta kunsido (12.5.90) kaj volonte sendas ĝin al interesuloj. La financplano de GDREA estis parto de la financplano de Kulturligo. Al ĝi apartenis jenaj eroj: la salajroj, la buĝeto por faka laboro, buĝeto por vojaĝoj, buĝeto por kvalifikado. Krom tio GDREA ne devis ion ajn pagi por la oficejo, telefono, afranko, oficvojaĝoj en GDR.

Dum la plej bona periodo (1987/1988) la buĝetoj estis: salajroj (4,5 oficistoj): 80.000 M, buĝeto por faka laboro: 85.000 M, buĝeto por vojaĝoj (valutoj de orientaj kaj okcidentaj landoj transkalkulitaj + veturkostoj: 15.000 M, buĝeto por kvalifikado (= seminarioj): 15.000 M. Aldoniĝas: 8.000 M luado de la oficejo, telefono kaj afranko: 10.000 M, oficvojaĝoj en GDR: 2.000 M, krom tio GDREA ricevis meblojn en la valoro de ĉ. 15.000 M. Do sume 230.000 M. Se temas pri la buĝeto por faka agado (85.000 M), nur „der esperantist" bezonis 30.000 M kaj „Paco" 18.000 M.

D. B.

Pri la ŝanĝoj

Letero al *Friedel Bues*

Estimata s-ro Bues!

Mi estas dankema al vi pro via artikolo „ŝanĝoj", ĉar ĝi donas al mi la eblecon klarigi iujn punktojn, kiuj evidente ne fariĝis klaraj en mia artikolo „GDREA en alia lando" (1/1990). Espereble la legantoj, instigitaj per via artikolo, ankoraŭfoje legos ambaŭ de mi verkitajn (do ankaŭ tiun „GDR – 40 jara" en 3/1989).

1. Mi ne apartenas al tiuj multaj homoj en la ankoraŭa GDR, kiuj, sen ruĝiĝi, nun deklaras, ke ĉion ili ja antaŭvidis, jam antaŭe estis rezistbatalantoj kontraŭ la reĝimo, sed estis subpremitaj kaj jam longe progits la baldaŭan disfalon de la reĝimo. Tiujn homojn oni ĉe ni nomas „Wendehälse". (t. e. proksimume „kolturniĝemuloj"), do homoj, kiuj rapide ŝanĝas sian opinion konforme al la cirkonstancoj ŝangiĝantaj, malkonfesante siajn antaŭajn poziciojn, laŭ la germana parolturno „li flirtigas sian flagon laŭ la vento"). Ne malmultaj homoj ĉe ni, inter ili mi mem, ne povis imagi al si, ke fakte la reĝimo estis tiom krima kaj konstruis multon, kiu estis favora por la unuopulo, sur „argilaj piedoj", piedoj kiuj evidente ja ege rapide disrompiĝis. Ĉiuj, kiuj antaŭvidis tiun evoluon, nun pravas. Ĉiuj, kiuj havis iluziojn kaj sincere kredis, ke ja la GDR-a versio de socialismo (kion ajn oni komprenu sub tiu nocio) estas reformebla kaj eltenos la estontecon, tiuj nete malpravas. Kaj mi apartenas al ili. Kaj pro tio oni prave kritikas min. Kaj vi ne aŭdos de mi la mensogon, ke mi ja ĉiam jam estis kontraŭ tiu ŝtato kaj ke mi jam ĉiam estis kontraŭ la reĝimo.
2. Jes, kion mi skribis en la ĉefartikolo de „de" 3/89, mi kredis. Neniu devigis min skribi tiun artikolon.
   Kaj se vi atente relegos mian duan artikolon (GDREA en alia lando), vi trovos, ke la aŭtoro (do mi) tute ne „neis ĉion, kion li ankoraŭ jesis en la antaŭa artikolo". Mi ne neis la 7 punktojn!! Ĉar principe estis tute vere, eĉ hodiaŭ oni tion agnoskas,
   - ke en GDR ne ekzistis senlaboruloj,
   - ke en GDR ne ekzistis (kaj ankoraŭ ne ekzistas) rabistaj luprezoj,
   - ke senpagas la socialaj prizorgoj (ankoraŭ),
   - ke stabilis la prezoj por diversaj varoj,
   - ke realiĝis grandega loĝejkonstrua programo,
   - ke oni forte subtenis junajn geedzajn parojn,
   - ke la krimeco en GDR ĝenerale estis relative malgranda k. t. p.

   Kompreneble, post la multaj publicaĵoj oni devas pli diference komenti tiujn konstatojn. Evidentas, ekzemple, ke la loĝkonstrua programo ne estis reala por finiĝi en 1990, aŭ ke jam antaŭe ekzistis forta drogdependeco de (tro) multaj homoj, se oni konsideras la alkoholon (sed ne de „duraj" drogoj kiel haŝiŝo, LSD k. s.). Kaj ni hodiaŭ scias, ke tio, kion mi menciis sub la 7 punktoj, grandparte ekonomie ne estis pravigebla. Sed la unuopulo ne vivis tiom mizere, kiel hodiaŭ iuj volas kredigi. Nu – kaj hodiaŭ (do julie 1990) ni havas 250.000 senlaborulojn kaj ĝis fino de la jaro eble transpasos la milionon. Ankoraŭ la luprezoj ne ŝanĝiĝis, sed ekde 1991 ili duobliĝos kaj ŝanĝiĝos okcidentmodele.
   Ankoraŭ la socialaj prizorgoj estas senpagaj, kaj espereble restos, ĉar oni akceptos la socialan asekuran sistemon de FRG. La prezoj ekde la 1-a de julio (enkonduko de la okcidentgermana marko) freneziĝis. Demandu viajn konatulojn en GDR!
   Prezoj de varoj el la vargrupoj, kiujn mi menciis sub la 4-a punkto en mia artikolo, fariĝis duoble aŭ trioble pli altaj, kvankam la salajroj en GDR ĝenerale nur estas triono de tiuj en FRG.
   Ekzistas tendencoj ĉe diversaj entreprenoj seniĝi de la infanvartejoj. Do kiel estonte fartos junaj geedzoj, mi ne scias, ĉiukaze ili malbone fartos, se ili estos senlaboraj. Kaj se temas pri krimeco, mi devas sincere konfesi, ke en mia artikolo mi ne konsideris la evidente gigantan krimecon de diversaj partiaj funkciuloj. Mi pensis pri la „ĉiutaga" krimeco. Kaj ĝi dum la lastaj monatoj saltegis supren. Kaj la drogmafio jam inter si disdividis la teritorion de GDR, por feliĉigi niajn junulojn.
   Kara samideano! Bonvolu ne miskompreni min! Mi ne volas pravigi aŭ defendi la ruinigi-

Der Deutsche Esperanto-Bund stellt sich vor

Der Deutsche Esperanto-Bund (DEB) wurde 1906 gegründet und war immer einer der aktivsten Landesverbände des Esperanto-Welt-Bundes (UEA). Schon 1908 wurde der Esperanto-Weltkongreß (UK) in Dresden ausgerichtet; unvergessen ist die Rekordbeteiligung von 4963 Teilnehmern des UK 1923 in Nürnberg, die erst durch den Jubiläumskongreß 1987 in Warschau übertroffen wurde. Nach dem zweiten Weltkrieg konnte der DEB nur in der Bundesrepublik wiederbeginnen und wurde dort zur unangefochten größten Esperantoorganisation, da die Esperanto-Arbeiterbewegung nicht mehr zu ihrer Vorkriegsstärke zurückfand. In den letzten zehn Jahren hat sich der DEB stark gewandelt. Seine Struktur ist durch das Statut von 1984 den Erfordernissen der Bewegung angepaßt worden. Die Aktivitäten finden auf drei Ebenen statt: Ortsgruppe, Landesverband, Bund. Eine straffe Mitgliederverwaltung sowie klare Richtlinien für die Anerkennung als regionale oder fachliche Unterorganisation stellen sicher, daß keine „Karteileichen" oder nicht mehr aktive Gruppen in der Statistik mitgeschleppt werden.

Zur Zeit gibt es 37 anerkannte Ortsgruppen (mindestens 10 Mitglieder) und 6 Landesverbände: Westberlin, Hamburg, Niedersachsen, Nordrhein-Westfalen, Baden-Württemberg und Bayern. Der Saarländische Esperanto-Verband, der sich nach den 1974er Querelen vom DEB trennte, ist noch nicht wieder beigetreten. Der DEB finanziert sich ausschließlich aus Mitgliedsbeiträgen und Spenden. Es gibt keinerlei staatliche Unterstützung, so daß z.B. die Aktiven für Verbandssitzungen ihre Urlaubszeit und ihr eigenes Geld aufwenden müssen. Da der DEB aber als gemeinnützig anerkannt ist, können alle Auslagen (Kilometergeld, Verpflegung usw.) wenigstens (bis zu einem Höchstbetrag) von den Steuern abgesetzt werden. Veranstaltungen, die im Rahmen einer anerkannten Bildungseinrichtung stattfinden, werden manchmal aus Mitteln der staatlichen Erwachsenenbildung bezuschußt.

Um nach außen ein zutreffenderes Bild von der Zahl der Esperantosprechenden zu gewährleisten, gibt es im DEB außer den ordentlichen, d.h. regelmäßig zahlenden Mitgliedern, auch die sog. fördernden. Diese sind ordnungsgemäß beigetreten, haben aber keine Zahlungsverpflichtung und erhalten auch keine Leistungen. Regionale oder fachliche Unterorganisationen bringen durch ihren Beitritt zum DEB automatisch ihre sämtlichen Mitglieder als (mindestens) korporative mit ein. Zur Zeit hat der DEB etwa 1450 ordentliche, dazu etwa 3700 fördernde oder korporative Mitglieder (einschließlich der Jugend).

Die Deutsche Esperanto-Jugend besteht aus den Mitgliedern, die noch nicht 27 Jahre alt sind. Sie ist rechtlich selbständig, hat eigene Beitragshoheit und eine eigene Bundeszeitschrift, die sechsmal im Jahr erscheinende GEJ-gazeto. Jedes Jahr geht bei Erreichen

---

tan GDR, kiun mi evidente nereale rigardis (kvankam tiu lando stampis mian identecon kaj multon donis al mi kaj miaj familianoj). GDR ne eltenis la juĝon de la historio. Fakto estas fakto. Mi nur volis montri, ke tiuj 7 punktoj ne estis tiom nerealaj. Mi pro tio ne povas akcepti vian interpreton, ke ili „ estis fakte la sama laŭda fanfaronado kiel la senguste organizita pompa jubilado okaze de la 40-jariĝo de GDR".

Cetere, mi tute sincere konfesas, ke mi estus dezirinta reformitan GDR, same kiel la plej multaj el tiuj, kiuj iniciatis kaj fakte faris la revolucion dum la oktobraj tagoj en 1989. Ĝuste tiuj homoj hodiaŭ ne regas en la parlamento. Ili ne ludas rolon. Aliaj transprenis la potencon kaj iras alian vojon. Mi tion ne prijuĝas, nur konstatas. Pri la lasta alineo de via artikolo mi tute konsentas. La vorto „socialisma" fariĝis senenhava, aŭ almenaŭ larĝe interpretebla. Sed bv. konsideri, ke mi, maldekstrulo, skribis la artikolon dum novembro 1989, plena de esperoj. Kaj fine, ekde novembro pasis tuta epoko. Por multaj tio, se oni fidas al iliaj vortoj, ŝajne estas infana ludo aŭ kvazaŭ promeno. Por mi ne, mi konfesas. *Via Detlev Blanke*

der Altersgrenze der entsprechende Geburtsjahrgang automatisch in die DEB-Verwaltung über. So wird bei aller notwendigen Unabhängigkeit der Jugend das Verbleiben in der deutschen Esperanto-Bewegung gesichert.

Der DEB ist demokratisch organisiert. Auf dem alljährlichen Deutschen Esperanto-Kongreß entscheidet die Mitgliederversammlung (Stimmrecht haben nur anwesende, ordentliche Mitglieder ab 16 Jahren) als oberstes Organ. Sie wählt alle zwei Jahre auch den Bundesvorsitzenden und anschließend dessen vorgeschlagene „Mannschaft" en bloc für den Vorstand. Die Amtszeit des Bundesvorsitzenden ist auf maximal sechs Jahre beschränkt. Zum Vorstand gehören ein Vertreter der Jugend (in der Regel der Vorsitzende der Deutschen Esperanto-Jugend) und (nach neueren Überlegungen) der Direktor des Deutschen Esperanto-Institutes. Zur Zeit hat der DEB sechs Vorstandsmitglieder; Bundesvorsitzender ist seit 1989 *Dr. Wolfgang Schwanzer* aus Limburg.

Das Deutsche Esperanto-Institut ist ein ständiger Ausschuß des DEB und wird von einem Kuratorium geführt. Es kümmert sich um die sprachliche und didaktische Ausbildung, nimmt Sprachprüfungen ab und setzt sich wissenschaftlich mit Esperanto auseinander. Sein Direktor ist zur Zeit *Dr. Werner Bormann*, Hamburg, Mitglied der Akademio de Esperanto.

Erreicht wurde in den letzten zehn Jahren, daß sich die Einstellung in der Öffentlichkeit (Medien, Politiker, Bevölkerung) stark positiv gewandelt hat. Ein eigener Pressedienst des DEB strahlt bundesweit aus und findet seinen regelmäßigen Niederschlag in Zeitungen, im Radio und manchmal auch im Fernsehen. Die Mitgliederzahl, die Ende der 70er Jahre unter 1000 gesunken war, steigt stetig, allerdings bei großer Fluktuation: Ein Großteil der Neumitglieder verläßt den DEB schon nach etwa drei Jahren wieder. Anzahl und Qualität von Esperanto-Veranstaltungen nehmen ständig zu, was man an dem sprunghaft hochschnellenden Budget des DEB ablesen kann. Die Mitgliedszeitschrift „Esperanto aktuell" erscheint seit 1981. Die Auflage beträgt zur Zeit 1350 Exemplare.

Nicht erreicht wurde, einen genügend großen Stamm von Aktiven zu motivieren, sich für die Esperanto-Arbeit einzusetzen. Trotz guter finanzieller Situation ist der DEB aber nicht in der Lage, hauptamtliche Kräfte zu bezahlen. Da der Arbeitsalltag in der Bundesrepublik in der Regel alle Kräfte beansprucht, um ein den hohen Konsumwünschen entsprechendes Einkommen zu erreichen, fehlt es gerade hochqualifizierten Esperantisten an Zeit und Energie, um nebenbei den DEB vorwärtszubringen. Die meisten Chancen, Esperanto im gesellschaftlichen Leben die ihm zustehende hohe Bedeutung zu verschaffen, können nicht genutzt werden. Vor allem fehlt es an Esperantolehrern, so daß viele Anfragen von Volkshochschulen, die Kurse einrichten wollen, abschlägig beschieden werden müssen. Da sich so die gesamte Arbeit nur auf wenige ehrenamtliche Aktive stützt, hat der DEB in der Bundesrepublik nicht den Erfolg, den er ohne weiteres haben könnte, und ist darüber hinaus bei jedem drohenden Ausfall eines einzigen bundesweit arbeitenden Beauftragten existentiell gefährdet.

Mit einiger Hoffnung sieht der DEB deshalb einem gemeinsamen Neubeginn der Esperanto-Organisationen der DDR und der BRD entgegen. Eine breitere Mitgliederbasis könnte auch die ersten in ganz Deutschland hauptamtlich Tätigen hervorbringen, der Schneeball, der endlich die Lawine ins Rollen bringt. Die Zeit ist dafür reif.

Rudolf Fischer

„Esperanto aktuell" jetzt abonnierbar!

„Esperanto aktuell" ist die Zeitschrift des Deutschen Esperanto-Bundes (DEB). Sie erscheint 8× im Jahr und kann zum Bezugspreis von 20 DM ab 1991 bezogen werden.

Für alle, die ihren Horizont im deutschen Teil von „Esperantujo" erweitern möchten, ist „Esperanto aktuell" unverzichtbar! Wie wäre es mit einem Probeheft?

Bitte wenden Sie sich an Literatura Servo „Espero", p./a. Rolf Beau, Jacobstr. 9, Leipzig, 7010.

„Ekologio ne konas limojn“

Jen la kadra temo de la 68-a kongreso de Germana Esperanto-Asocio (GEA), kiu ĉijare, de la 1-a ĝis 4-a de junio 1990, okazis en Freiburg. Partoprenis ĉirkaŭ 230 esperantistoj, ne nur el FRG, sed ankaŭ el Brazilo, Bulgario,ĈSFR, Francio, GDR, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Luksemburgo, Nederlando, Pollando, Sovetunio kaj Svisio.

El GDR partoprenis 10 esperantistoj, inter ili la prezidanto de GDREA, *d-ro Ronald Lötzsch,* la sekretario, *d-ro Detlev Blanke,* kaj la prezidanto de la Distrikta Estraro Potsdam, *Rainer Pauli.* Por tiu oficiala delegacio de GDREA, la kongreso estis tre grava, ĉar ĝi donis la eblecon, informi interesitajn funkciulojn de GEA pri GDREA kaj mem konatiĝi pli bone kun GEA. Do – tion ni tuj notu, ĉi-rilate la kongreso sendube estis sukcesa kaj grava por la plua alproksimiĝo de ambaŭ asocioj. En sia festparolado pri la kongresa temo la nederlandano Bert de Wit tre imprese desegnis la danĝeron de ekologia kolapso de nia tero, se la registaroj ne komune kaj rapide entreprenus la necesajn paŝojn. Al la kongresa programo ankaŭ apartenis tuta aro da fakkunsidoj, i.a. kunvenis la naturamikoj (TANEF), la katolikoj (KELI), la instruistoj (AGEI) kaj la komputilistoj (KOMPRO). Oni povis aŭskulti prelegon pri la Germana Esperanto-Instituto, pri la brazilia esperantista bieno “Bona Espero”, sed ankaŭ pri rusa kuirarto, nova ideografia lingvo kaj aliaj temoj. Wera Blanke gvidis seminarion pri terminologia laboro, d-ro Detlev Blanke pri interlingvistiko. *D-roj Lötzsch* kaj *Blanke* kune kun la prezidanto de GEA, *d-ro Wolfgang Schwanzer* kaj la vicprezidanto *Rainer Heckhausen* prezentiĝis en publika kunveno por pridiskuti la estontajn rilatojn de ambaŭ asocioj.

Ne mankis kulturaj aranĝoj, ekskursoj, dioservo kaj du abundaj libroservoj.

La 69-a Germana Esperanto-Kongreso okazos de la 17-a ĝis 20-a de majo 1991 en Munkeno. Interesuloj aliĝemaj skribu al

Esperanto-Klub München,
Postfach 200803,
D - 8000 München 2.

Pri la 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA

Bilance kaj germanperspektive en Brandenburg

La preparoj por la 5-a okazis jam antaŭ la politikaj ŝanĝegoj en GDR. Ni timis, ĉu entute ni povus okazigi la planitan aranĝon, ĉar subite aperis tute nova financa situacio. Jam jarkomence fariĝis klare, ke Kulturligo (kaj kun ĝi GDREA) ne plu disponos pri tiom da mono kiom antaŭe. La tuta 5-a devos sin komplete mem financi. Ni tamen kuraĝis kaj fidis al "niaj" membroj. Brave kaj prave! Partoprenis 160 GDR-anoj. Krome venis eksterlandanoj el Pollando 50, el Mongolio 7 (!), el Litovio 6, el Hungario 5, el Nederlando, Rusio kaj Usono po 1 persono. El FRG venis 6 personoj, do sume 237 personoj. Per tio la 5-a Centra Renkontiĝo apartenas al la plej grandaj aranĝoj, kiujn GDREA estis aranĝinta ĝis nun. Do – digna finaranĝo (?) dum la 25-a jaro de la oficiala ekzistado de Esperanto en Kulturligo. Inter la listigitaj landoj vi trovis Mongolion. Evidente granda escepto, ke mongolaj esperantistoj aperis eksterlande. Pro tio kelkajn vortojn: Nu, 7 junaj (parte tre junaj) mongoloj veturis dum 15 tagoj por partopreni nur kelktagan aranĝon en GDR. Ili jam alvenis merkrede, la 23-an de majo, al la planita junulara aranĝo, kiu bedaŭrinde estis nuligita flanke de la Esperanto-Junularo. Oni tamen trovis eblecon en Brandenburg okupiĝi pri ili. (Dankon al familio *Kuhlmey.*) Ĉiuj estis komencantoj, kiuj eklernis Esperanton nur januare ĉi-jare. En Ulan-Bator ekzistas kelkaj grupoj, en kiuj oni –sen lerniloj– studas la lingvon. Espereble ilia unua renkontiĝo kun la funkcianta lingvo sufiĉe motivigos ilin, por ke estonte ni parolu anstataŭ la rusan la lingvon de Zamenhof. La vojaĝgrupon el Pollando gvidis la prezidanto de Monda Turismo, Andrzej Grzembowski. El FRG partoprenis la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, *d-ro Wolfgang Schwanzer,* la redaktoro de „Esperanto aktuell", *d-ro Rudolf Fischer,* kaj la eksprezidanto de GEA, *Helmut Klünder,* kaj la edzino *Ella.*

Jam ĵaŭde okazis la unuaj aranĝoj: gazetara konferenceto kaj vespere renkontiĝo kun la esperantistoj el Brandenburg kaj kun la junaj mongoloj. *D-ro Detlev Blanke* prezentis sonbendojn en Esperanto kaj iom revuis aspektojn de la kultura sceno en Esperantio. Sub la prezidio de la prezidanto de la Distrikta Estraro Potsdam de GDREA, *Rainer Pauli,* malgranda loka teamo estis preparinta multajn gravajn detalojn de la renkontiĝo. Tiel la vendrede alveturintaj „kongresanoj" trovis ĉion necesan: 4 libroservoj (*Beau, Lemke, Pachter* kaj esperantistoj el Brandenburg) prezentis escepte riĉan librooferton. Multega gazetmaterialo estis havebla preskaŭ senpage. Post la ricevo de la necesaj dokumentoj eblis parto-

La internacia prezidio de la inaŭguro. Antaŭ la pupitro: d-ro Ronald Lötzsch, la prezidanto de GDREA. Sidas (de maldekstre dekstren): Wall, Ĉuluundorĝ, d-ro Pava, Pauli, d-ro Blanke, Müller (reprezentanto de Kulturligo), Ŝatrova, d-ro Schwanzer, Fettes (vidu la tekston!).

preni urbekskursojn. La aranĝo mem okazis en la „Ratskeller" (urbestra kelo), malnovstila, tre oportuna kaj komforta restoracio. La interkona vespero samtempe estis la inaŭgura. Post malfermo flanke de la prezidanto de GDREA, *d-ro Ronald Lötzsch,* kaj bonveniga paroladeto flanke de *Rainer Pauli,* sekvis salutoj de la eksterlandaj reprezentantoj. Salutis unue la reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉefredaktoro de la ankaŭ en GDR nun abonebla revuo „Esperanto", *Mark Fettes* el Nederlando. Sekvis la prezidanto de GEA, *d-ro Schwanzer,* el Hungario *d-ro Jozsef Páva,* el Litovio *s-ro Raĉkauskas,* el Mongolio *s-ro Ĉuluundorĝ,* el Pollando *s-ro Andrzej Grzembowski,* el Rusio *f-ino Katja Ŝatrova* kaj el Usono *Charles Wall.* La inaŭguron ankaŭ partoprenis reprezentantoj de la distrikta kaj subdistrikta estraroj de Kulturligo kaj de la urba kultura fako. Artan kontribuon prezentis la kanzonisto *Klaus Ebert* el Berlin, kiu ne nur prezentis kelkajn proprajn kanzonojn (en la traduko de *Manfred Arnold*) sed ankaŭ konatajn kiel „Mek' Tranĉilo" de Brecht.

La ĉefa tago estis la sabato. Ĝin malfermis *Mark Fettes* per tre stimula prelego „Esperanto kaj UEA en monda perspektivo". Sekvis fare de *d-ro Schwanzer* la prezento de Germana Esperanto-Asocio. Kaj finis la antaŭtagmezon bilanca parolado de la sekretario de GDREA, *d-ro Detlev Blanke* pri „25 jaroj Esperanto en Kulturligo – perspektivoj de GDREA?" Evoluis iom da diskuto. Posttagmeze ĉiuj 3 ĉefaj prelegoj estis diskute daŭrigitaj kaj pliprofundigitaj per 90minutaj seminarioj (Esperanto kaj UEA, GEA, kiel daŭrigi kun GDREA?) Krom tio seminario pri scienc-teknika apliko de Esperanto. Post la seminarioj sekvis 3 prelegoj: *Mark Fettes* (NL): „Lingvoj – legado – libero: UNESKO kaj alfabetigo", *Michael Behr* (GDR): „Elektronikaj komunikiloj", *Johannes Pachter* (FRG): „Esperanto-bibliotekoj en la mondo". Krome okazis germanlingva forumo kun prezidianoj de GEA kaj GDREA pri la german-germana estonteco de Esperanto. La vespero promesis apartan artan ĝuon. La pola aktorino *Barbara Dłużyńska (Łukaszewska)* prezentis sian tradukon kaj monodraman version de la fama „Eta princo" de Antoine de Saint-Exupéry. La arta prezento kaj la kristale klara prononco ravis ĉiujn. Sekvis plua arta ĝuo: La litovaj esperantistoj *Terese Ĥmieliaŭskaite* kaj *Arimantes Raĉkaŭskas*, akompanitaj de *Joana Kaminskaite* prezentis ariojn, kanzonojn kaj popolkantojn. La dimanĉo estis ekskursa tago, ĉi-foje per motorboato (kun muziko kaj tagmanĝo) sur Havel, rivero, kiu trafluas kaj urbrandas Brandenburg. La bela ŝipveturo ne nur donis eblecon por babili kaj ĝui la pejzaĝon sed ankaŭ danki al la brandenburgaj organizintoj, kiuj faris vere grandegan laboron por sukcesigi tiun belan aranĝon.

Kion ankoraŭ mencii? Aperis porokaza poŝtstampo. En la urbo en kelkaj lokoj estis tute ne ignoreblaj informbendoj pri la renkontiĝo. Ankaŭ la distrikta gazetaro informis.

Kaj krome, grava detalo, la tuta aranĝo, kiu estis komplete financita de la partoprenintoj mem, estis tute nedeficita. (Tiaj grandaj aranĝoj por GDR-esperantistoj ĝenerale estis senpagaj aŭ nur minimumkostaj.)

La 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA estis aparte sukcesa. Ĝi donis multajn stimulojn kaj eble ankaŭ kuraĝon, ne nur por ekuzi la novajn ŝancojn sed ankaŭ por venki la minacojn kaj malfacilaĵojn, kiujn donis kaj donos al ni la ŝanĝoj en nia ankoraŭa lando. La renkontiĝo estis certasence bilanca kaj perspektivdiskuta. Eble ĝi estis la lasta tiaspeca aranĝo de GDREA. Memoru pri ĝi! Ĉar, laŭ Kästner, tiu, kiu forgesas pozitivaĵojn, fariĝos malbona, kaj kiu forgesas malbonaĵojn, fariĝos stulta. Ni fariĝu nek malbonaj, nek stultaj. Ni iru digne kaj memkonscie en la german-germanan kaj, sekve, ankaŭ novEŭropan, estontecon.

partopreninto

Esperanto en altlernejoj – denova seminario en Bad Saarow

Inter la 27a de aprilo kaj la 2-a de majo 1990 denove okazis internacia seminario en la jam iom famiĝinta urbeto Bad Saarow. Ĝin aranĝis Esperanto-Asocio de GDR, laŭ la konataj bonaj kondiĉoj en la Kulturliga kvalifikejo kaj ripozejo „Eibenhof" („Taksusa Korto"). El sep landoj (Bulgario, FR Germanio, Germana DR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio) partoprenis 34 lingvistoj, altlernejaj instruistoj, studentoj, kaj aliaj interesiĝintoj, kiuj kune traktis la temon „Esperanto – objekto de akademia esplorado kaj instruado", celinte spertinterŝanĝon kaj instigon je pli larĝa kaj komuna altlerneja agado de kompetentaj esperantistoj.

Post enkonduko al la seminaria temo (*d-ro Detlev Blanke,* GDR) sekvis 19 prelegoj, ĉiuj akompanataj de interesaj diskutoj, ofte kun praktikaj konsiloj:

1. *Ilona Koutny* (Hungario) prezentis la „Esperanto-fakon en Eötvös-Universitato de Budapest (nuno kaj perspektivo)", kiu jam de 1966 funkcias kiel parto de la Katedro pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, ebligante esperantologiajn studojn ĝis diplomiĝo.
2. Pri la „Strategia signifo de akademia poresperanta agado por la disvolvigo de landa Esperanto-movado (ĉe la ekzemplo de Rumanio)" prelegis *prof. Ignat Bociort,* prezidanto de la refondita Rumana Esperanto-Asocio, aparte substrekinte la evoluon de altlernejaj kontraŭ- kaj poresperantaj diskutoj dum la malfacilaj eksteraj kondiĉoj en la lando.
3. „Atingoj kaj necesoj – raporto el propraj spertoj" estis la subtitolo al la prelego de *d-ro Werner Bormann* (FRG) pri „Akademio Internacia de la Sciencoj kaj Akademio de Esperanto", du akademiaj instancoj de la Esperanto-movado, kiuj, laŭ la preleginto, bone povus kaj devus stimuli unu la alian, malgraŭ ilia evidenta neperfekteco.
4. La sama *d-ro W. Bormann* ankaŭ prezentis la nuntempan agadon de la tradiciriĉa Germana Esperanto-Instituto: „La Esperanto-organizaĵoj en okcidenta Germanio kunlaboras pri difinitaj taskoj en sia GEI kaj rezignis je propra agado en la samaj kampoj. Tiuj komunaj taskoj estas lingvoekzamenoj kaj biblioteko."
5. *D-rino Alicja Sakaguchi* el FRG prezentis superrigardon pri siaj interlingvistikaj esploroj kaj prelegoj en la Goethe-Universitato de Frankfurt (Main). Menciindas ŝiaj diversaj lastatempaj publicaĵoj, i.a. pri la fama dana lingvisto *Rasmus Kristian Rask* kaj liaj interlingvistikaj laboroj.
6. *Elena Ŝevĉenko* (Sovetunio) donis superrigardon pri „Interlingvistikaj kaj esperantologiaj aktivecoj en USSR". Ŝi vicigis aktivecojn de la Instituto pri lingvoscienco de Akademio de sciencoj de USSR, de la universitato de Tartu, kaj la interlingvistikan eldonagadon en USSR.
7. *D-ro Detlev Blanke* prezentis ĉe la ekzemplo de la interlingvistika aktivado en GDR teoriajn kaj praktikajn aspektojn de la naciskala akademinivela agado. Nur ekde 1970, ekzemple, en GDR aperis 110 germanlingvaj interlingvistikaj kontribuoj de 36 aŭtoroj, ĉiuj en sciencaj revuoj aŭ antologioj resp. samnivelaj eldonaĵoj.
8. *Eva Bojaĝieva* (Bulgario) donis tre personajn spertojn el sia Esperanto-instruado en la Supera Medicina Instituto en Plovdiv. La titolo de ŝia prelego: „Ideoj pri Esperanto-instruado kaj praktika uzado de la lingvo".
9. Pli ĝeneralan superrigardon pri la „Instruado de Esperanto en altlernejoj de Bulgario" donis *Fani Mihajlova,* menciante i.a. ke jam en preskaŭ ĉiuj altlernejoj de Bulgario iam funkciis Esperantokursoj, kaj en la lasta studojaro en tri.
10. Kvankam la eksteraj kondiĉoj pliboniĝis por la Esperanto-instruado en Hungario, post la sendevigo de la rusa lingvo kiel lernfako, mankas kompetentaj instruistoj por ĉie eluzi la situacion, bedaŭris *Katalin Smidéliusz* en sia resumo de la „Nuntempa situacio de Esperanto-instruado en Hungario". Tamen ŝi raportas, ke Esperanto estas oficiale instruata en du universitatoj kaj kvin pedagogiaj altlernejoj.
11. Same el Hungario, sed pli ligite al la instruado en du altlernejoj de la urbo Nyiregyháza, János Bányász prezentis, en formo de sep tezoj, siajn spertojn el Esperanta instruado kaj metodika esploro („Eblecoj kaj rezultoj en la altlerneja Esperanto-instruado").
12. *Werner Hocke* (GDR) skizis la evoluon de la Esperanto-instruado en la Pedagogia Altlernejo de Magdeburg, de la unuaj provoj, ĝis la oficialigo kiel nedeviga instrufako (ekde novembro 1989). Ankaŭ kvante liaj kursoj fariĝis ŝajne la plej sukcesaj en GDR, kun pluraj dekoj da partoprenantaj studentoj.
13. Interesan projekton de certe tre bezonata internacia lernolibro por altlernejaj studentoj, kiu estas eldonota verŝajne en 1992, sed jam nun praktike prov-uzata, prezentis ĝia kunaŭtorino, *d-rino Sabine Fiedler* (GDR). Disdono de proveldonaĵoj de la unuaj lecionoj provokis viglan diskuton, kaj la partoprenantoj spertinterŝanĝis pri la uzebleco de la materialo.
14. Pri estiĝo kaj planoj de la „Rondo de Amikoj de Esperanto en la universitato" prelegis *d-ro Wolfgang Schwarz* (GDR) de la Teknika Universitato en Dresden. Tie en marto 1989 fondiĝis rondo de neesperantistaj universitataj profesoroj, instruistoj kaj studentoj kun la celo subteni kaj propagandi Esperanton.
15. *Katrin Mattusch* (GDR) proponis praktikajn eblecojn de scienca aplikado de Esperanto inter junaj esperantistoj. En sia prelego „Junulara fakagado en Esperanto" ŝi prezentis dek du diskutindajn, realigeblajn projektojn.
16. Pri psikolingvistikaj eksperimentoj kun „Asociaj kampoj en Esperanto" raportis *Elena Ŝevĉenko* (Sovetunio). La eksperimentoj celas i.a. esploron de la strukturoj de lingva pensado kaj de konservado de lingvaj scioj en la cerbo, por helpi la ellaboron de lernolibroj, studvortaroj k.s.
17. *Andrzej Pettyn* (Pollando) prezentis siajn spertojn, precipe metodikajn, el dujaraj kursoj en varsovia duonsupera lernejo, kie li instruis dum kvar jaroj, uzante i.a. formojn de memlernado, diversajn parolekzercojn ktp. Siajn metodikajn spertojn ĉi-rilate la preleginto grandparte aperigas en la internacia ekzercolibro „Esperanto en dialogoj" (Varsovio, 1990).
18. La prezidanto de GDREA, *d-ro Ronald Lötzsch,* prelegis pri gramatikaj „Germanismoj en Esperanto", citante el diversaj numeroj de „Saksa Kuriero" kaj „der esperantist", kaj tiel substrekante pli konscian lingvouzon, ankaŭ kaj ĉefe dum la altlerneja instruado.
19. *Wera Blanke* informis pri la celoj, agadoj kaj la nuna stato de la Terminologia Esperanto-Centro de Universala Esperanto-Asocio. Substrekendas, ke TEC nun disponas pri oficejo kaj pagita sekretariino en Zagrebo/Jugoslavio.

Movadaj informoj II

Ni daŭrigas la prezenton de informoj pri la strukturo de la internacia Esperanto-movado por grave helpi al ĉiu leganto de „der esperantist" praktike utiligi ĉi tiun strukturon. Jen ni prezentas la ĉefajn gazetojn. Se vi volas aboni ilin, petu informojn rekte ĉe la redakcioj. La asteriske (*) signitaj titoloj estas aboneblaj pere de Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando). La enkrampa jaro indikas, ekde kiam la revuo aperadas.

Gazetaro esperantista

- *Australian Esperantist, The* (1940), 9 numeroj jare, parte anglalingva. Eld., admin. kaj red. Aŭstralia Esperanto-Asocio, Box 2122T., G.P.O. Melburne 3001, Aŭstralio. Prezo: 20 aŭstr. dol.
- *Aŭstria Esperanto-Revuo* (1946), trimonata, parte germanlingva. Eld. kaj admin. Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, A - 1150 Vieno. Aŭstrio. Red. Walter Haberl.
- *Boletin* (1949), dumonata. Eld. kaj admin. Hispana Esperanto-Federacio. Red. adreso Carreras Candi 34–36.08028 Barcelona, Hispanio. Ĉefred. Giordano Moya. Prezo: 18.00 gld.*
- *Bona espero* (1964). ISSN 0006-7024. duonjara. Ĝenerale kultura. Eld. Sud-Afrika Esperanto-Asocio, Red. Edwin de Kock, Poŝtfako 902-143, Bon Accord, 0009, RSA.
- *Brita esperantisto, La* (1905), dumonata. Literatura, movada. Eld. kaj admin. Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Ave., London, Britio W11 4UF. Prezo: 18,30 gld.
- *Budapeŝta informilo* (1970), monata. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, redakcia adreso Budapeŝta Informilo, Pf. 193, H - 1368 Budapest, Hungario. Prezo: 21,00 gld.*
- *Bulgara esperantisto* (1919), monata. Movada, literatura. Eld. kaj admin. Bulgara Esperantista Asocio. Redakcia adreso Bulgara Esperantisto, Bul. Hristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario. Prezo: 13,20 gld.*
- *Bulteno* (1956), 4–6foje jare, parte germanlingva, Eld. kaj admin. Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio, PF. 117, A - 1103 Wien, Aŭstrio. Red. Leopold Patek.
- *Bulteno* (1952), kvaronjara, parte germanlingva. Eld. Germana Esperanta Fervojista Asocio, Red. kaj admin. Wilhelm Grass, Sachsenstr. 7, D - 8620 Lichtenfels, FR Germanio.
- *Dia regno* (1908), monata. Eld. Kristana Esperantista Ligo Internacia. Red. J. van Keulen, v. Beethovensingel 91 A, 3131 ED Vlaardingen, Nederlando. Prezo: 21,00 gld.*
- *Ekonomia bulteno pri Usono* (1980), monata. Abonadreso INTERFAKTO, P. O. Box 42205, Washington, D. C. 20015. Prezo: 30,00 gld.*
- *Ekumenismo* (antaŭe Biblia revuo, 1964), trimonata, Eld. Tutmonda Ekumena Ligo. Admin. Antonio Gambuti, Piazza Duomo 4, I - 48100 Ravenna, Italio. Red. Sr. Mary Thenguvila. Prezo: 21,00 gld.*
- *ELNA Newsletter* (1964). ISSN 0030-5065. dumonata, parte anglalingva. Eld. kaj admin. Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P. O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. Red. Cathy Schulze.
- *El Popola Ĉinio* (1950), monata. Kolorilus., Socipolitika, kultura, movada. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo. Admin. Guozi Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉina Popola Respubliko. Prezoj varias laŭlande: per UEA, 1 jaro: 34 gld., 2 jaroj: 58 gld., 3 jaroj: 82 gld.*
- *Esperantista laboristo,* La/Le travailleur espérantiste (1912), dumonata, parte franclingva, mimeo. Eld.kaj admin. Féderation Espérantiste du Travail, 179, rue Ordener, F - 75018 Paris.
  Prezo: 40,00 fr. fr. en Francio: 60,00 fr. fr. eksterlande.
- *Esperantista vegetarano* (1914), kvaronjara organo de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, Eld. Slovaka Esperanto-Asocio. Red. Stano Marček, Zvolenská 15. CS - 03601 Martin, Ceĥoslovakio.*
- *Esperanto* (1905), ISSN 0014-0635, monata. Movada, kultura. Eld. kaj admin. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, Red. Mark Fettes. Prezo varias laŭlande (gld. 44,50, US$21, GM 39, enoj 3300 ktp.): petu informojn ĉe UEA aŭ via landa asocio.
- *Esperantisto slovaka* (1946), dumonata. Eld. Slovaka Esperanto-Asocio, Red. Dr. Stanislav Košecký, Sklabinská 8, 83106 Bratislava, Ĉeĥoslovakio.
- *Esperanto aktuell* (1983), aperas okfoje jare. Movada. Eld. kaj admin. Germana Esperanto-Asocio, Lambertstr. 12, D - 6430 Bad Hersfeld. FR Germanio. Prezo: 24,00 gm.
- *Espéranto en marche, L'* (1969), dumonata, franclingva. Eld. Asocio por Esperanto. Red. S-ino S. Fichefet-Jacquet, Rue Destrée 104, 6210 Charleroi, Belgio. Prezo: 150 bf.
- *Esperanto en Skotlando* (1947). UK ISBN 0014-0643, trionjara. Kultura kaj literatura. Eld. Skota Federacio Esperantista. Admin. kaj red. Albert Goodheir. 16 Woodlands Drive, Coatbridge, Britio ML5 11, E. Prezo: en Britio 1,50 br. pundo; ekster Britio 2,00 br. pundoj.
- *Esperanto, L'* (1913), monata, parte itallingva. Movada kaj kultura. Eld. kaj admin. Itala Esperanto-Federacio, via Viloresi 38, I - 20143 Milano, Italio. Prezo: 15,00 gld.*
- *Esperanto-fervojisto* (1947 kiel La fervojisto), monata. Parte franclingva. Eld. Franca Fervojista Esperantista Asocio, 1 rue d' Athènes, F - 75009 Paris, Francio. Admin. G. Horn, red. G. Mazaud. Prezo: 28 fr. fr.
- *Esperanto News,* UK ISSN 0306-5693, dumonata. Grandparte anglalingva. Eld. kaj admin. Esperanto-Asocio de Britujo, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF, Britio. Red. R. Bedford. Prezo: 5,50 br. pundoj.
- *Esperanto panorama* (1970), ISSN 0772-540 X, dumonata, ĉefe nederlandlingva. Eld. kaj admin. Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B - 2000 Antwerpen,

---

La partoprenantoj decidis liveri resumojn de siaj prelegoj al la organizintoj por tiel ebligi kopiadon de la resumaro por ĉiuj interesitoj. Ekzempleroj estas haveblaj ĉe GDREA. Krome, ĉiuj prelegoj estas surbendigitaj.

Vespere pludaŭris la diskutoj, kvankam alitemaj, pli aktualaj aŭ pli distraj: pri la komputila sistemo Esparol *(Ilona Koutny),* pri partopreno en Ido-kongreseto *(Alicja Sakaguchi),* pri studenta esperantista agado (*Johann Pachter,* FRG), kaj granda diskutrondo pri la sociaj ŝanĝoj en orienteŭropaj landoj kaj ilia efiko al la Esperanto-movado. *Ulrich Becker*

Belgio. Red. Guido van Damme. Prezo: 400 fr. en Belgio, 21 gld. en Nederlando.

- *Esperanto Teacher* (1939). ISSN 0046-2527, duonjara, ĉefe anglalingva, mimeo. Eld. Esperanto Teachers Association. Red. Mr. Arnold D.N. Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leonminster, Here-fordshire, HR 68 QD. Prezo: 5,00 br. pundoj.
- *Espero, La* (1913), ISSN 0014-0694. 8 numeroj jare, parte svedlingva. Organo de Sveda Esperanto-Federacio. Respondeca eld. Bertil Aakerberg, red. Karin Lindquist. Prezo: 33,00 gld.*
- *Espero el Koreujo, La* (1976), dumonata, Kolorilus. Eld. HAN Moo-hyup (Alfonso), ĉefred. Puramo S.C. Chong, C.P.O. Kesto 5154. Seulo 100. Koreio. Prezo: 24,00 gld.*
- *Espero katolika* (1903), monata. Eld. kaj admin. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, via F. Berni 9, I - 00185 Roma, Italio. Red. Sac. Battista Cadei, Antonio De Salvo. Prezo: 30,00 gld.*
- *Etnismo* (1972), kvarmonata. Informilo pri etnaj problemoj. Eld. admin., kaj red. Uwe Joachim Moritz, Im Römerfeld 44, D - 5180 Eschweiler, FR Germanio. Prezo: 27,00 gld.*
- *Fenomeno, La* (1969, kiel Komuna Esperanto-Gazeto, renovigita en 1987), ISSN 0921-2302, monata. Movada, kultura; parte nederlandlingva. Organo de Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando (FEN). Eld. FEN; adm. S.P. Smits, Dunantstr. 164, NL - 2713 VC Zoetermeer, Nederlando; ˙red. K. de Boer k. a., KRIO, Riouwstraat 172, NL - 2585 HW Den Haag. Prezo: 40,00 gld*
- *Fervojisto* (1947), monata, mimeo. Eld. Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda. Redakcia adreso: Postbus 556, 3500 AN Utrecht, Nederlando.
- *Fonto* (1980), monata. Beletra. Eld. G.A. Bays. Caixa Postal 49, BR - 98900 Chapecó-SC. Brazilo. Red. W. Auld. Prezo: 45,00 gld.*
- *Forumo* (1978), neregula. Eld. Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, Admin. kaj red. Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham, Britio TW1 2HF. Prezo: 3,00 br. pundoj (inkluzivas la membrecon).
- *Franca esperantisto* (1908), parte franclingva. Eld. kaj admin. Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis rue de la Cerisaie, F - 75004 Paris, Francio. Red. Hervé Gonin. Prezo: 45,00 gld.*
- *Franca katolika esperantisto* (1949), trimonata, parte franclingva, mimeo. Eld. Franca Katolika Esperanto-Asocio. Admin. kaj red. J. Vincent, Lóazo, B.P. 54, F - 49150 Baugé, Francio. Prezo: 23 fr. fr.
- *GEJ-gazeto* (1979), dumonata, parte germanlingva, eld. Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D - 5300 Bonn 1, FR Germanio (pĝk. Dortmund 1352-42-467). Red. Thomas Pusch. Prezo: 15 gm.
- *HEJS-juneco,* dumonata. Redakcia adreso HEJS-Juneco, Fco. Maragas 95, 3-2, E - 08922 Sta. Coloma de Gramanet, Hispanio. Red. Jesuo Armengol.
- *Heroldo de Esperanto* (1920). 17 numeroj jare. Movada, literatura. Eld. kaj admin. Heroldo de Esperanto, Via N. Sandre 15, I - 10078 Venaria (Torino). Red. Ada Fighiera-Sikorska. Prezo: 40,00 gld.* (aerpoŝta aldono: 3,30 por Eŭropo; 9,90 por Afriko kajAmeriko; 13 por Azio kaj Aŭstralio).
- *Hungara fervojista mondo* (1957), trimonata. Faka, movada. Eld. kaj admin. Fervojista Sekcio de HEA. Népköztársaság útja 73–75, H - 1174 Budapest, Hungario. Red. János Pátay. Prezo: 16 irpk.
- *Hungara vivo* (1961), dumonata. Literatura, kultura. Eld. kaj admin. Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H - 1368, Hungario. Red. Vilmos Benczik. Prezo: 21,00 gld.*
- *ICEM-Esperanto* (1976), ISSN 0184-8542, trimonata, mimeo, parte franclingva. Por instruistoj laŭ Freinet-metodo. Eld. Institut Coopératif de l'École Moderne. Admin. Henri Ménard, 1 rue Galissonière, Le Pallet, F - 44330 Vallet, Francio. Prezo: 50 fr. fr. (15 irkp).
- Interligilo (1965), dumonata, mimeo. Eld. kaj admin. Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio, pk. 25, BG - 1000 Sofia, Bulgario. Red. D. Petrov. Prezo: 2.50 us. dol. aŭ egalvaloro, 1,75 rubloj aŭ egalvaloro.
- *Internacia Esperanto-Muzeo* (1950 kiel Informilo). ISSN 0020-5710, trimonata. Movada, kun bibliografiaj notoj. Eld. kaj admin. Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg Batthyanystiege 3-a etaĝo, 1010 Wien, Aŭstrio.
- *Internacia fervojisto* (1949), dumonata. Eld. kaj admin. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Red. E. Henning Olsen, Äderupvej 182, DK - 4700 Naestved, Danlando.
- *Internacia jura revuo* (1966), duonjara, Eld. Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Admin. kaj red. D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A - 8020 Graz, Aŭstrio. Prezo: 150 aŭs. ŝil. aŭ egalvaloro.
- *Internacia pedagogia revuo* (1970), kvarmonata. Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Red. István Ertl, Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK, H - 1364 Budapest, Pf. 107, Hungario. Prezo: 40 sv. kr. (inkluzivas membriĝon al ILEI).
- *Internationale informationen,* trimonata, germanlingva. Kultura, movada. Eld. kaj admin. Gesellschaft für Internationale Verständigung – Esperanto-Freunde. Fünfhausgasse 16, A - 1150 Wien, Aŭstrio. Red. Walter Haberl.
- *Israela esperantisto* (1959), trimonata. Eld. kaj admin. Esperanto-Ligo en Israelo, P.O.K. 22041, IL - 61220 Tel-Aviv, Israelo. Red. Josef Semer. Prezo: 10 irkp. aŭ egalvaloro.
- *Jarlibro* (1908), ISSN 0075-3491, jara. Eld., admin. kaj red. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo (kun individua membreco en UEA) varias laŭlande, ekz. 28,00 gld., 12,00 us. dol. aŭ 2200 enoj. Petu aktualan kotiztabelon de UEA.
- *Jarlibro* (1922), dujara. Eld. red. kaj admin. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F - 75020 Paris, Francio.
- *Jugoslavia fervojisto* (1957), dumonata, parte nacilingva, mimeo. Eld. kaj admin. Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj. Redakcia adreso: Beograd, poŝtfako 563, Nemanjina 6 – ZJZ, Jugoslavia. Red. Gvozden Srediĉ.
- *Jugoslavia stelo* (1987), trimonata, parte nacilingva. Oficiala organo de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Eld. Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Danijela ozme 7/IV, 7100 Sarajevo, Jugoslavio. Ĉefred. Đorđe Dragojlović. Prezo: 22,00 gld.*
- *Juna amiko* (1973), trimonata. Por lernejanoj. Eld. kaj admin. Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H - 1368 Budapest, Hungario. Red. Stefan MacGill. Prezo: 8,40 gld.*
- *Kancerkliniko, La* (1976), OSSN 03998-5822. trimonata. Politika, kultura. Eld. kaj admin. Ĵak Le Puil, 5 Place

Lavoisier (61), F - 93380 Pierrefitte, Francio. Red. Ĵ. Le Puil, L. Septier. Prezo: 30,00 gld.*

- *Kataluna esperantisto* (1910, reaperis 1982. 5-a epoko). Movada, kultura. Oficiala organo de Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat des Correus, 32318, 08080 Barcelona, Catalunya. Hispanio. Red. Hèctor Alòs k.a.
- *Komuna Esperanto-gazeto* (1969), monata, parte nederlandlingva. Eld. Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando. Admin. s-ro A.M.D. Korff, Debussyrode 14, NL - 2717 BP Zoetermeer, Nederlando. Red. S.P. Smits. Prezo: 40,00 gld.*
- *Koncize* (1967), dumonata. Komuna bulteno de la okcident-eŭropaj junularaj Esperanto-organizoj. Eld. kaj admin. Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, D - 5300 Bonn 1, FR Germanio (pĝk. Dortmund 135242-467). Red. Thomas Pusch (kaj aliaj). Prezo: 12,00 gld.*
- *Kontakto* (1963). ISSN 0023-3692, dumonata. Socia, kultura, kun facilaj tekstoj por komencantoj. Eld. kaj admin. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red. Leif Gunnar Nordenstrom. Prezoj varias laŭlande.
- *Kulturaj Kajeroj* (1958), trimonata. Eld. Esperantista Kulturdomo Grésillon. Admin. Pierre Babin, 13 bd. de la Chauvinière, F - 44000 Nantes, Francio. Red. J. Vincent, P. Babin, S. Guillot. Prezo: 24,00 gld.*
- *Kvakera esperantisto* (1954), kvarmonata. Eld. Kvakera Esperantista Societo. Admin. Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, Suffolk, IP10 PJZ, Britio. Red Brian Bone. Prezo: 18,00 gld.*
- *Lanterno Azia, La* (1983), dumonata, grandparte en la korea, Oficiala organo de Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Box 4258, Seoul, Korea Respubliko.
- *Language Problems and Language Planning/Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (1968 kiel La monda lingvo-problemo), ISSN 0272-2690, kvarmonata. Scienca revuo kun tekstoj en diversaj naciaj lingvoj, kun ampleksaj resumoj i.a. en Esperanto.
  Eld. University of Texas Press en kunlaboro kun Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Admin. Journals Dept., University of Texas Press, Box 7819, Austin TX 78713, Usono. Cefred. Humphrey Tonkin. Prezo: individuaj abonoj 18 us. dol.; instituciaj abonoj 27 us. dol.*
- *Literatura foiro* (1970), monata. Eld. kaj admin. Kooperativo de Literatura Foiro. Ĉefred. Perla Ari Martinelli. Redaktejo: via Pantano, I - 20122 Milano, Italio. Prezo: 48,00 gld. (aerpoŝta aldono 8,00 gld.).*
- *Lumo, La* (1983 kiel Alumeto), trimonata. Eld. Kanada Esperanto-Asocio. Red. Olga du Temple, 765 Braemar Ave., Sidney BC, V8L 3S1 Kanado.
- *Medicina Heroldo* (1974), jara. ISSN 0102-2350. Eld. kaj admin. Brazila Esperantista Kuracista Rondo. Strato Domingos Grosso 53-Venda Nova, BR - 30.000 Belo Horizonte (MG), Brazilo.
- *Medicina internacia revuo* (1971, antaŭe *Medicina Revuo*), duonjara. ISSN 0465-5435. Eld. Universala Medicina Esperanto-Asocio, Admin. kaj ĉefred. Saburô Yamazoe, 4-8-9 Iwagami-mati, Maebasi-si. 371 Japanio. Prezo: 22,50 gld (aerpoŝte).*
- *Mezmara stelo* (1979), trimonata, parte maltlingva. Eld. Malta Esperanto-Societo. Red. Francis Portelli, redakcia adreso: Esperanto-Societo (Malta), P.O. Box 142, Valletta, Malto.
- *Migranto, La* (1951), trimonata. Eld. Esperantistaj naturamikoj (TANEF). Adm. Erna Döring, pf. 225, CH - 4003 Basel, Svislando. Red. F.W. Poppeck. Prezo: 7,00 sv. fr.
- *Monata cirkulero* (1968), monata. Eld. kaj admin. Kultura Centro Esperantista, pf. 771, CH - 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Red. Claude Gacond.
- *Monato* (1980), 10 numeroj jare. ISSN 0772-456X. Politika, ekonomia, kultura. Eldonejo: Monato, Frankrijklei 140, B - 2000 Antwerpen, Belgio. Red. Stefan Maul, Pferseerstr. 15, D - 8900 Augsburg, FR Germanio. Prezo: 59,00 gld, nedeviga aerpoŝta aldono 15,00 gld.*
- *Movado, La* (1951), monata, grandparte japanlingva, eld. Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj Esperanto-Ligoj Tokai, Kjušua kaj Ĉuugoku-Sikoku. Admin. KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204 (Kobori Mansion Toyonaka), Toyonaka. Oosaka-ku. Japanio. Red. Yositaka Mine. Prezo: 3200 enoj.
- *Norvega esperantisto* (1909), dumonata. Parte norveglingva. Eld. kaj admin. Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, Oslo 5, Norvegio. Red. M. Christensen, D. Langmyhr, H. Wiull, E. Østrem. Prezo: 18,00 gld.*
- *Nova Vojo,* monata. Komp. Hirai Atusi, Eld. Esperanto-Propaganda Asocio, Tenon-kyo, Kameoka-ŝi, Kioto-ku, 621 Japanio. Plejparte en la japana.
- *Nov-zelanda esperantisto* (1929), dumonata, parte anglalingva. Eld. kaj admin. Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, pk. 330, Wellington 1, Nov-Zelando. Red. J. Major, M.A. Prezo: 25 NZ dolaroj.
- *Oomoto* (1925), duonjara. Religia, kultura, prilingva. Eld. kaj admin. Internacia Fako de Oomoto, Kameoka-ŝi, Kioto-hu, 621 Japanio. Red. Takaŝi Agou. Prezo: 18,00 gld.*
- *Pacaktivulo,* La (1953), neregula. Eld. kaj admin. Mondpaca Esperantista Movado. Red. Clément Tholet, 54 rue de Hineux, B - 4400 Herstal, Belgio.
- *Revista portuguesa de Esperanto* (1973), trimonata. Eld. Portugala Esperanto-Asocio, admin. kaj red. Alves de Moura, R. Joao Chagas AM. P - 2795 Linda-a Velha, Portugalio, Prezo: 450 esk.
- *Revuo orienta, La* (1919). ISSN 0035-4406, monata, parte japanlingva. Eld. kaj admin. Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12–3. Sinzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio. Prezo: 2400 enoj; por aerpoŝto: aldone 2100 enoj (Azio, Oceanio), 2520 enoj (Usono), 2940 enoj (Eŭropo, Sudameriko, Afriko).
- *Sano* (1976 kiel Medicinistaj informoj), trimonata kiel aldono de la asocia gazeto Starto. Eld. kaj admin. Ĉeha Esperanto-Asocio, Medicinista Sekcio, Jilska 10, Ĉ - 11001 Praha 1, ČSFR. Red. MUDr. Josef Hradil. Prezo: 10,50 gld.*
